

Johann Wolfgang von Goethe,
 Noktolido de migranto
tradukita de Richard Schulz

Vi, sendito de l' chiel',
 Foriganto de doloro,
 Antau kies brila hel'
 Forsekighas chiuj ploroj,
 - Ve pro la adado laco,
 Kia de la faroj fin'? -
 Dolcha paco,
 Nestu do en mia sin'!

*Traduko de la Germana poemo "Wanderers Nachtlied" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26).*

Arg-738-1490 (2013-02-26 15:13:51)

Tiu poem-esperantigo trovighis sur la pagho 136 de la "Vestfaliaj Flugfolioj" eldonitaj de Richard Schulz (Rikardo Ŝulco). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Johann Wolfgang von Goethe,
 Noktokanto de migranto
tradukita de Manfred Retzlaff

Vi, venanto de l' chielo,
 Foriganto la doloron,
 Freshiganta per mielo
 De l' sufereganto koron,
 - Min plenumas ega laco!
 Kial tiu ghoj' kaj ve'? -
 Dolcha paco,
 Venu, mi sopiras tre!

*Traduko de la Germana poemo "Wanderers Nachtlied" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1983-06-17.*

MR-063-2 / Arg-738-1491 (2012-12-29 13:38:37)